La metodo estas memkomprene interveno en la homa hormonmastrumado, ĉar la progesteronsignalo por la subteno de la gravedo estas interrompita. Sed tiu interveno estas nur preterpasa, ĉar tre gravas, ke la fekundeco por venonta gravedeco ne estas malpliigita.

La metabolado estas iniciita per demetilado kaj hidroksilado de la 17-propinilĉeno pere de Citokromo P450 3A4. La duoniĝo-tempo mezuriĝas je 90 horoj.

Diskutado pri la leĝaj cirkonstancoj estas tre diversaj en la unuopaj landoj, memkomprene ankau la etikaj aspektoj. Entute oni konstatis, ke en Francio, kie Mifepristono estas allasita en 1986 sub la nomo RU 486, la nombro de la (konataj) abortoj ne plialtiĝis. Ĉ. nur 605 decidas sin al tiu medikamenta metodo. La klinikaj kostoj de abortigo ĉe apliko de Mifepristono estas en Francio la samaj kiel ĉe kuretado, en Germanio au Svisio kontraue nur triono ĝis dekono de la kirurgia hospitala traktado. Lau leĝa vidpunkto la apliko de Mifepristono akcentigas denove la debaton pri la t. n. limdatopermeso (germane *Fristenlösung*), ene de kiu la leĝo ĝenerale permesas la abortigon.

El religia vidpunkto temas antau ĉio pri la diskuto, kiam la homa feto estas vivaĵo kun korpo kaj animo, do lau religia koncepto kompleta homa vivaĵo. Tiu diskuto eble estas senfina, sed ne senkomenca, ĉar meze de la 13a jarcento Tomaso de *Aquin* laudire skribis, ke la vira feto ricevas sian animon post ok semajnoj, virina kontraue nur post 12 (!) - tio ja povas esti ebla, sed kiu do scias tion precize, verŝajne ne mezepoka sanktulo.

Medicinistoj ĝenerale supozas, ke la ekformiĝo de la cerbo kaj de la organoj komenciĝas ĉ. post la 49a gravedeco-tago. La ekformiĝo de la nervosistemo, kondiĉo por la sentiment-kapablo, plenfunkcias ĉ. nur je la fino de la tria monato.

Je la tempo de la publikigo la medikamento estas permesita en jenaj 11 landoj: FR, GB, SE, DE, AT, ES, BE, NL, DK, FI, GR.

Literaturo

Roth, H. J., Fenner, H., Arzneistoffe (1994) 2. Aufl., Georg Thieme Verlag, Stuttgart (DE). (Stereoizomeraĵaj formuloj).



*RECENZO*

## *Qumran - Die Schriftrollen vom Toten Meer* La skribo-roloj de la Morta Maro

Ayala Sussmann, Ruth Peled
En kunlaboro kun la Israela Antikvaĵo-Instanco

Katalogo de la ekspozicio, *Stiftsbibliotek St. Gallen*
(surbaze de *Library of Congress, Washington D. C.*, 1993)
Eldonejo *Am Klosterhof, CH 9004 St. Gallen,* 1999
ISBN 3-906616-48-7 (144 p., 32.- CHF).

La dokumentigo havas jenajn partojn:

- la trovoj en la kavernoj: kodigitaj priskriboj de ĉiuj fragmentoj,
- la setlejo de Khirbet Qumran: keramikaĵoj, ligno, ledo, teksaĵoj,
- aneksaĵo pri la antikvahebreaj skriboformoj, la konservado, informoj pri publikigado kaj literaturo.

Unua rimarko: la tekstoj ne estas sekretaĵoj! La unua okkapa skipo sub gvido de la franca dominikana monaĥo *Roland de Vaux*, direktoro de *Ecole Biblique*, Jerusalemo, vekis la impreson de sekretigumado, ĉar la publikigo de la unuaj tekstoj dauris relative longe.

Kiam la publikigado (volumo I en 1955 kaj volumo VI nur en 1977) pli malrapidiĝis, sciencistoj avertis pri 'scienca skandalo *par exellence*'. Tamen volumo VIII aperis nur en 1990. Jam en la 1980aj jaroj la restriktiva alirebleco al la manuskriptoj estis publike atakita. Ekestiĝis la konataj konspiro-riproĉoj (Baigent, M.), ke la materialo enhavus nepublikigitajn sekretojn, kiuj povis skui la fundamentojn de jam ekzistantaj religioj. Tiam oni pligrandigis la sciencan stabon de 8 al pli ol 50. Intertempe ĝi ampleksas 60 fakuloj el 9 landoj.

La sinsekva publikigo okazas per *Oxford University Press* en la serio *Discoveries in the Judaean Desert (DJD)*, ekde 1955 aperis 24 volumoj, planitaj estas pluaj 13 volumoj, indeksvolumo kaj la

kompleta konkordanco. Estas havebla ekde 1993 fotografaĵoj de ĉiuj fragmentoj en *Microfiche-Edition* (E. Tov).

La grava arkeologia evento komenciĝis en 1947, kiam juna bedueno Muhammad adh-Dhib - serĉante devojiĝintan kapron - trovis en malbone alirebla kaverno (numero 1) ledajn skriborulojn (hebr. *megilot*) envolvitajn en putrita tolo. Tiu unua trovo okazis mallonge antau la t. n. israela sendependiĝa milito. Entute enhavis la unua trovo 7 grandajn rulojn; tri estis kaŝe aĉetitaj; la kvar aliaj estis ofertitaj al vendo en 1954 en *The Wall Street Journal* kaj aĉetitaj je 250000 dolaroj. La lasta kaverno 11 estis malkovrita en 1956 (enhavis la Psalmo-rulon kaj la Templo-rulon, je 8.75 metroj la plej longa dokumento).

Entute 5 kavernoj estis malkovritaj de beduenoj (ĉar la enhavoj montriĝis kiel valora enspezofonto, ekz. kaverno 3 enhavis du oksidiĝintajn rulojn el marteligita kupro); 6 de la kavernoj estis malkovritaj de arkeologoj. La plej grava kaverno estas la 4 (1952).

Troviĝas en *Qumran* dekmiloj da surskribitaj fragmentoj, ofte tre malgrandaj pecetoj, kun miloj da literaturaj tekstoj (aldone ekzistas ĉ. 150 el aliaj lokoj de la judea dezerto). Tamen, la Jesaja-rulo (kaverno 1) mezuriĝas 7.34 m, la Templo-rulo (kaverno 11) 8.75 m.

La laboro de la arkeologoj koncernas jenajn ĉefpunktojn:
- la enordigo de la fragmentoj kaj ties tradukoj,
- la skribaĵoj (hebrea, aramea, nabatea, greka),
- la materialoj (ledoj kaj pergamenoj, skribiloj kaj inkoj),
- la trovujoj,
- la konservado (tiu okazas nun ĉe konstanta aerhumideco kaj temperaturo inter arkiva altpreciza kartontavoloj).

La kialo, ke tiu ekspozicio okazas en *St. Gallen* estas ankau la graveco de la *Codex Sangallensis* 627 (*de bello judaico* de *Flavius Josephus*) por la historiografa interpretado, ĉar ĝuste tiu teksto raportas pri la ekzisto de la religia komunumo de la Essenoj.

Koncerne la fakula transskribado oni konstatas, ke la plej gravaj tekstoj lau religiaj enhavoj estas skribitaj en la plej historia, malnova skribaĵo (paleohebrea). Estas ankau tre rimarkinde, ke - post




komparo kun la ĝis nun plej malnova biblia teksto en Petersburgo (ĉ. 1000 p. K.) - la tekstfideleco estas kvazau centprocenta, escepte la formoj de kelkaj literoj; la tekstotradicio de la Biblio do estas strikte konservita, pri kio ĉiam ekzistis motivigitaj duboj.

Germanlingvaj tradukoj de la tekstoj prizorgis kun kritika skrupula zorgemo J. Maier.

Jam *de Vaux* supozis, ke ĉe la elfosaĵoj devis temi pri la dezertoenklavo kaj ĉe la ruloj pri la biblioteko de la Esenoj. La datigoj baziĝas sur historiaj, paleografiaj kaj lingvistikaj kriterioj, subtenitaj per la C-14 radiokarbonmetodo. Kelkaj manuskriptoj devenas el la tria antaukrista jarcento, la plejparto estas originaloj au kopioj el la unua antaukrista jarcento kaj la plej novaj tekstoj ekestiĝis en la jaroj ĝuste antau la ruinigo de la setlejo *Khirbet Qumran* en 68 p. far roma legio. La loko estis forlasita du jarojn antau la disrompiĝo de la judea memadministrado kaj de la ruinigo de la templo en Jerusalemo en 70 p. K.

La ruloj donas informojn pri la epoko ekde la jaro 520 a. K., sed specife pri la epoko inter la dua antaukrista jarcento kaj la detruo de la Dua Templo.

La origino de la sekto de *Qumran* eble estis la *Chassidim*, antihelenismaj grupoj post la Makabeo-renverso en 168 a. K., ĉar *Qumran* estis fondita en la dua duono de la dua jarcento en la tempo de la Makabeo-dinastio (166 - 134 a. K.).

Pri *essainoi* (gr., lat. *essaei*) respektive *essenoi* (gr., lat. *esseni*), eble el la hebr. *hasidim* (la piuloj), raportas la juda filozofo *Philo* de Aleksandrio, *Dio Chrisostomos, Plinius*-la-plimaljuna kaj specife *Flavius Josephus* (ĉ. 38 - 100), juda komandanto de Galileo ĉe la juda ribelo. Li priskribas la disiĝon de la judoj dum la tempo de la Dua Templo en konservativaj sadukeoj (kiuj akceptis nur la skribitan leĝon), en la pli sekularaj fariseoj kaj la separatisme asketaj esenoj, kiuj *'havis proprajn sanktajn librojn k praktikis ... bapton k ritan komunan manĝadon'* (PIV); aldone ili okupiĝis pri eskatologia, apokalipsa kaj mesianisma vizio.

Kontraue al la tradicia juda lunokalendaro kun 354 tagoj (sinkronizita kun la astronomia temposistemo), la esenoj uzis propran kalendaron, kiu baziĝis sur la sunsistemo kaj ampleksis 364 tagojn: la jaro kun 52 semajnoj, dividitaj en kvar sezonoj kun po 13 semajnoj (simila temposistemo estis jam konata el pseudoepigrafaj verkoj). La festoj ĉiam trafis la samajn semajnotagojn. Tio estis grava kialo por la distancigo kontrau la alia judaro, ĉar la festo- kaj fasto-tagoj de la sekto estis por la aliaj normalaj tagoj.

Kvankam la vorto esenoj ne troviĝas en la manuskriptoj estas la identifado sufiĉe klara. La tekstoj mencias la dividon de la judaro en la gentojn efraim-anoj, manase-anoj kaj juda-anoj, kiuj tradicie respondas al fariseoj kaj saduceoj; ĉar la autoroj de la *Qumran*-ruloj signas sin en la tekstoj kiel juda-anojn, la identigo estas preskau klara, tamen de kelkaj sciencistoj pridubita.

Temas verŝajne pri la plej fruaj bibliaj, apokrifaj, pseudoepigrafaj kaj sektanaj tekstoj. Inter ili estas reprezentitaj la plej multaj libroj de la Malnova Testamento, kvankam nur kiel fragmentoj kaj kelkfoje eĉ nur kiel malgrandetaj pecetoj. Ankau kopio de la Septuaginto troviĝas. Kelkaj el la tekstoj estis evidente rigarditaj de la sektanoj kiel kanonaj kaj estis pro tio studataj kaj kopiataj (ekz. la libro henoĥ).

Specifa grupo estas tiu de la sektotekstoj, antau 1947 fakte nekonataj. Ankau la jam en 1896 de *Solomon Schechter* en Kairo trovita Damasko-rulo povis esti definitive enordigita nur post trovo de ĝia kopio en *Qumran*.


Ilian separigitan vivon praktikis la esenoj dum du jarcentoj. La konservado kaj eltrovado de ilia literaturo estas grava arkeologia evento kaj multe alportas al la kompreno pri la interrilatoj inter judaismo kaj kristanismo.






הייתי בחטאי ועוונותי לשאול מכרוני ותצילני
𐤉𐤄𐤅𐤄 כרוב רחמיכה וכרוב צדקותיכה גם אני את
שמכה אהבתי ובצלכה חסיתי בזוכרי עוזכה יתקף
לבי ועל חסדיכה אני נסמכתי סלחה 𐤉𐤄𐤅𐤄 לחטאתי
וטהרני מעווני רוח אמונה ודעת חונני אל אתקלה
בעווה אל תשלט בי שטן ורוח טמאה מכאוב ויצר
רע אל ירשו בעצמי כי אתה 𐤉𐤄𐤅𐤄 שבחי ולכה קויתי
כול היום ישמחו אחי עמי ובית אבי השוממים בחונכה
[ ]לם אשמחה בכה

Bildo 1
Psalmo-rulo IIQPsª (tekillim) - ĉ. 30 - 50 p K.
Trovita en kaverno 11 en 1956 kaj derulita en 1961, skribita en kvadratskribo de la heroda tempo; la tetragramo (JHVH) en paleohebrea skribo. La transskribajo rilatas al la subaj 9 linioj.
La suba rando de la rulo staranta en argilokruĉo estas detruita.



Bildo 2
La libro Henoĥ (thanokh) - $4QEn^{a}$ - en aramea skribo. Unu de la plej maljunaj pseudoepigrafiaj libroj - ĉ. 200 - 150 a. K.



Bildo 3
Formrepertuaro de la Qumran-keramikaĵoj. Kelkaj de la roloj, trovitaj en 1947, troviĝis en tiaj cilindraj orgilkruĉoj.





Bildo 4
Kalendaro-rulo - 4Q321 - (Mischmarot $B^{d}$) - ĉ. 50 - 25 a. K.
Trovita en kaverno 4

## Literaturo

Oficialaj serioj: *Discoveries in the Judaean Desert*, 27 vols. Oxford: Clarendon Press, 1955 - 1998 (daŭrigotaj)

Baigent, M. Leigh, R., *The Dead Sea Scolls Deception*. London: Jonathan Cape, 1991
(germane) *Verschlusssache Jesus: Die Qumranrollen und die Wahrheit über das frühe Christentum*. München: Droemer Knaur, 1991

Flusser, David, *Judaism and the Origins of Christianity*. Jerusalem: Magnes Press, 1988

Flusser, David, *The Spiritual History of the Dead Sea Sect*. Tel Aviv: MOD Books, 1989
(germane) *Das essenische Abenteuer: Die jüdische Gemeinde vom Toten Meer; Auffälligkeiten bei Jesus, Paulus, Didache und Martin Buber*. Winterthur: CARDUN AG, 1994

Maier, Johann, *Die Qumran -Essener: Die Texte vom Toten Meer*. 3 Bd. München/Basel: Ernst Reinhardt, 1996

Tov, E., *The Dead Sea Scolls on Micrifiche: A Comprehensive Facsimile Edition of the Texts from the Judaean Desert.* Leiden: E. J. Brill, 1993

*Internetadreso: http://www.qumran.ch*